

ZPRÁVY

ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO

Numero 1 (17)

OSVĚTOVÝ ÚSTAV V PRAZE

Marŝo 1965

20 JAROJ DE LIBERA ĈEĤOSLOVAKIO

Ĉi-jare Ĉeĥoslovakio festas la dudekan datrevenon de sia liberigo. La batalo de la ĉeĥa kaj slovaka popoloj por la nacia libereco kaj socia justeco, komencita per la Slovaka Nacia Revolucio, kaj per la Ĉeĥa Popolleviĝo en majo 1945, fariĝis elirpunkto por la nacia kaj demokratia revolucio. La socialisma konstruado de Ĉeĥoslovakio, apoganta sin je internacia kunlaboro kun Sovetunio kaj la ceteraj socialismaj landoj, atingis gravajn rezultojn. Ekestis moderna socialisma industrio kaj bazo por la nova agrikultura grandproduktado. La vivnivelo de la loĝantaro, la disvolvo de la kulturo, scienco kaj klereco, vicigas Ĉeĥoslovakion inter la plej evoluigintaj ŝtatoj de la mondo. La venko de la socialismaj produktadilatoj firmigis la politikan kaj moralan unuecon de la laboranta popolo, potencigitan per la unueco kaj frata kunlaboro de la ĉeĥa kaj slovaka nacioj. Funde ŝanĝiĝis ankaŭ la internacia pozicio de Ĉeĥoslovakio, kies ekzistenco estas garantiata per la alianco kun la monda socialisma sistemo.

La solvo de la nacieca problemo estis unu el la plej signifoplenaj revoluciaj ŝanĝoj, efektivigitaj fare de la nacia kaj demokratia revolucio. La nova popoldemokratia respubliko estis konstruita surbaze de plena egalrajtra kunekzistado de la ĉeĥa kaj slovaka nacioj en komuna ŝtato kaj surbaze de internaciismo. La rekono de la individueco de la slovaka nacio estis ligita kun la nova ŝtatjura aranĝo kaj kun la klopodo pri ekonomia kaj kultura egaligo de la ĉeĥa kaj slovaka nacioj. La penado de la Komunista Partio konsekvence orientiĝis al la firmigo de la unueco kaj kunlaboro de ĉiuj demokrataj kaj patriotaj fortoj en la kadro de la vasta kaj unueca Nacia Fronto plifortigita per la unueco de la laborista klaso kun la terkulturistaro, inteligentularo kaj mezaj urbaj tavoloj.

Sub la gvido de la Komunista Partio la laboranta popolo de Ĉeĥoslovakio energie kontraŭstaris al la planoj de la reakciaj fortoj en februaro 1948 kaj decidiĝis sekvi la vojon de socialismo. La februara venko definitive solvis la problemom de la ŝtatpotenco favore al la laborista klaso. La februaraj eventoj plifortigis la internacian pozicion de Ĉeĥoslovaka Respubliko.

Dum la socialisma konstruado Ĉeĥoslovakio fariĝis lando kun alta industria produktado. Esence fortiĝis ĝia internacia pozicio rilate la mondan ekonomion. Kvankam Ĉeĥoslovakio per sia teritorio okupas nur 0.09 % de la tersurfaco kaj per la nombro de la loĝantaro nur 0.5 % de la homaro, en la suma industria produktado ĝi okupas la 6-8-an lokon en la mondo kaj 4-6-an lokon en Eŭropo. Kune kun la evoluo de la ekonomio progresis ankaŭ ĉiuj ceteraj sferoj de la publika vivo — la tutmondaj sukcesoj de la ĉeĥoslovakaj scienco, tekniko, kulturo kaj arto estas nerefutebla pruvo, ke la ĉeĥa kaj slovaka kulturoj akiris honoran lokon en la mondskala konkuro.

Nedisigebla parto de la socialisma konstruado fariĝis la batalo por paco, por la definitiva elimino de militoj, por la starigo de egalrajtaj kaj frataj rilatoj inter nacioj kaj ŝtatoj. La ĝenerala linio de la ĉeĥoslovakaj eksterlandaj politikoj direktiĝas laŭ la principo de paca kunvivado. Kune kun USSR kaj la ceteraj socialismaj landoj nia

Respubliko konsekvence kontraŭas ĉiujn agresemajn tendencojn kaj postulas la plenan senarmigon. Ĝi aktive penadas pri estigo kaj kreskigo de ekonomiaj kaj kulturaj rilatoj kun la ŝtatoj kun malsamaj sociordoj, surbaze de egalrajteco. Tion pruvas ankaŭ la amikaj rilatoj de Ĉeĥoslovakio kun la malmulte evoluigintaj landoj en Azio, Afriko kaj Latina Ameriko.

La dudeka datreveno de la liberigo de Ĉeĥoslovakio trovas nian popolon ĉe krea kaj fruktodona laboro por sia Respubliko, solida ĉenero de la pacama socialisma tendaro.

Oldřich Kníchal

ZPRÁVA o 17. Kongresu polských esperantistů v Lodži

Kongres se konal ve dnech 18-20 září 1964 a zúčastnilo se ho kolem 500 esperantistů ze všech krajů země a jako hosté zástupci ústředních esperantských organizací Bulharska, Československa, Jugoslaviie, Madarska, NDR a Holandska.

Na pozvání Polského svazu esperantistů se jako delegát ČSEV zúčastnil a kongres pozdravil s. Augustín Cambál, předseda esp. kroužku z Martina. Kromě něho navštívili kongres jako turisté soudr. Dryák, Kníchal a Sviták z Prahy a s. Musilová z Poděbrad.

Pořadatelem kongresu byla z pověření Polského svazu esperantistů ve Varšava jeho oblastní pobočka v Lodži. Kongresu předsedal člen představenstva UEA prof. J. Toczyski z Gdaňska.

Dějištěm kongresu byl Lodžský kulturní dům v centru města, jen hlavní slavnostní programy, t. j. zahájení a koncert se konaly ve velkém sále prezidia Lidové rady.

Za oficiální instituce přednesl velmi příznivý projev poslanec Sejmu s. Ajnenkiel; pozdravné dopisy mimo jiné zaslali: bývalý prezident Polské akademie věd prof. Kotarbiński a nynější prezident prof. Groszkowski.

V pracovní části programu podal programovou zprávu gener. tajemník PSE magister Zd. Czuba, přednášku na tému „Šíření esperantského hnutí ve světě“ přednesl redaktor J. Uspieński, probíhala plenární zasedání volených delegátů kongresu a zvláštní schůze odborných sekcí (mládež, učitelé, vědci aj.). — Diskuse při projednávání zpráv ústředního předsednictva a komisí PSE byla velmi živá a zejména při zprávách oblastních poboček často ostře kritická.

Plenum delegátů zvolilo nové ústřední předsednictvo Polského svazu esperantistů, do jehož čela byli znovuzvoleni prof. dr. J. Loth jako předseda a mag. Zd. Czuba jako gen. tajemník. Byly schváleny resoluce a závěry pro další rozvoj polského esperantského hnutí, zejména k rozšíření výuky mezinár. jazyka na školách PLR a k organizačnímu upevnění hnutí. Pokud jde o státní dotace, projevuje se v poslední době tendence k jejich omezování a k přesunu krytí běžných výdajů esperantských organizací z členských příspěvků a výnosů z vlastního vydavatelství PSE ap.

Z kulturní a společenské části programu kongresu uvádíme:

— koncert dobré úrovně, předvedený předními pěvci i hudebními umělci a kvartetem „Beltono“ — z části v esperantu,

— pěkný a přátelský seznamovací večer s tancem,

— úspěšnou řečnickou soutěž mladých esperantistů,

— slavnostní odhalení pamětní desky na domě v ulici Zamenhofa,

— zajímavé exkurze velkým průmyslovým městem kongresu, Lodži a divadelní hru od Sh. Vincelberga „Kataki signifas malamiko“, kterou výborně sehráli umělci „Lidového divadla“; toto představení bylo opravdovým prožitkem a „zlatým hřebem“ kulturního programu kongresu.

Všichni zahraniční hosté kongresu byli podarováni soupravou esperantských knih a sborníkem o městu Lodži v polštině.

Na kongresu jsme navázali velmi přátelský styk s jugoslávským zástupcem Dim.

Bjelanovičem, organizačním tajemníkem Jugoslávského esperantského svazu. Nabídl nám výměnou návštěvu 2-3 funkcionářů v roce 1965 za účelem bližšího poznání práce obou esperantských organizací a prohloubení přátelských vztahů. Rovněž doporučoval organizovat vzájemnou výměnu mladých esperantistů mezi našimi a jejich esperantskými kroužky, případně účast naší mládeže na Jugoslávské esperantské brigádě mládeže v červnu až červenci 1965.

Z polských funkcionářů jsme byli v bližším styku s členem předsednictva PES inž. T. Pleskaczyńskim, od něhož jsme získali řadu cenných informací o činnosti, organizaci a postavení PES a vyměnili jsme si vzájemně zkušenosti.

Přes obvyklý určitý zmatek a různé organizační nedostatky, prokázal průběh celého kongresu, že esperantské hnutí v Polsku je činorodé a poměrně mladé. Množství kursů v celé zemi, pořádaných i na mnohých (vysokých) školách, dodává hnutí stále nové stoupence a pracovníky.

Můžeme tedy konstatovat, že polští esperantisté udržují dobrou tradici, hodnou kolébky esperanta. Svou pokrokovou iniciativou, zaměřenou na praktické uplatňování mezinárodního jazyka v současném světě, dosahují mnoho pěkných výsledků v propagaci výstavby nového, socialistického Polska a neméně na poli mezinárodní spolupráce. Jejich činnost je uznávána a podporována i nejvyššími státními orgány.

11. 10. 1964 Fr. Sviták

TEMPO PASAS, MEMOROJ RESTAS

Dum mia labortago pri vi, Ĉeĥoslovakio,
mi pensas kaj revadas'.
Ĉar dank' al Esperanto
vian landon mi ekkonis,
vian popolon ekŝatis.

Pro nia amikeco,
pro lingvo Esperanto
reveni mi promesis,
revon efektivigis
kaj dank' al Esperanto
geamikojn revidis!

Kelkajn landojn mi konas,
ĉiujn popolojn ŝatas,
sed Ĉeĥoslovakio,
dank' al Esperanto,
plej profunde estas
en mia animo.

For de mia patrujo —
Francujo amata, —
malproksime de vi,
lando ĉeĥoslovaka,
en Svislando mi vivas,

laboron mi ordigas,
infanojn mi prizorgas,
pri vi, Ĉeĥoslovakio
mi pensas kaj revadas.

Ĉar dank' al Esperanto
du patrujojn mi havas:
belan Ĉeĥoslovakion
kaj Francujon amatan.

Odette Frégonara

9 MUSY

1200 Genève, Svislando

Úspěšná činnost esperantistů v naší dopravě

Esperantské kroužky v naší železniční dopravě jsou již několik let při závodních klubech ČSD v České Třebové, Havl. Brodě, Olomouci, Děčíně, Nymburce a loni byly ustaveny v Praze (Ministerstvo dopravy), Jaroměři, Bohumíně, Ostravě a české Lípě. V některých městech jsou esperantisté z naší dopravy organizováni v městských esperantských klubech nebo kroužcích, jako např. v Brně, Bratislavě, Žilině, Zvolenu, Čes. Budějovicích, Mostě, Hradci Králové a jinde.

Dne 13. ledna 1965 byla ustavena Sekce železničářů při Českoslov. esperantském výboru v Praze 2, Vinohrady, Blanická 4. Dosud se přihlásilo 240 členů z celé naší republiky.

Vyzýváme esperantisti z naší dopravy, kteří se dosud nepřihlásili, aby tak učinili na uvedenou adresu!

Vedením sekce byl pověřen pracovník Ministerstva dopravy v Praze s. Bohumil Král, který po svém návratu z mezinár. kongresu železničářů-esperantistů (IFEF = Internacia Fervojista Esperantista Federacio) v Budapešti, ve smyslu naší výzvy k utvoření československé sekce železničářů-esperantistů (při CSEV), vyvinul cennou iniciativu a přípravné náborové a organizační činnosti. Navázal styk s esperantskými kroužky v naší dopravě a zjistil nebo získal písemně i osobně 240 zájemců. Přičinil se o ustavení esperantského kroužku při závodním výboru ROH Ministerstva dopravy, kde je také vedoucím esperantského kursu, do kterého se přihlásilo 35 zaměstnanců dopravy z Prahy.

Kursy esperanta v naší dopravě jsou v České Třebové, Havl. Brodě a jinde. — Činnost esperantistů v naší dopravě a zvláště podporu Ministerstva dopravy, ocenilo také ústředí IFEF v časopise „La Internacia Fervojisto“.

Úkolem sekce a esperantských kroužků v naší dopravě je vzájemná spolupráce u nás i s ústředím IFEF a jejími pobočkami v socialistických a ostatních zemích v duchu zásad mírového soužití. Rudé Právo napsalo 21. jan. 1965, že esperanto usnadní našim železničářům spolupráci, praktický styk a výměnu zkušeností se železničáři v cizích zemích a dodává, že tím způsobem naši dopraváci drží krok s ostatními zeměmi, zvláště menšími, které žádají používat esperanta jako služební řeči pro pracovníky v mezinárodní dopravě. Tak maďarští esperantisté navrhnou, aby esperanta se používalo v pohraničních železničních stanicích různých států pro služební věci. Také švýcarské železničářské odbory navrhnou používat esperanta v mezinárodní dopravě.

V Evropě je Mezinárodní liga železničářů-abstinentů, která má 75 000 členů.

Odbočky této Ligy ve Finsku, Švédsku, Norsku a Dánsku předložili ústředí návrh, aby také mezinárodní řeč esperanto byla jednou z úředních řečí, kromě německé, francouzské a anglické, na mezinárodních konferencích. Během mezinárodní schůze železničářů-radioamatérů v Hamburku němečtí esperantisté předložili návrh na používání esperanta nejen pro jejich mezinárodní konference, ale také pro radioamatérské vysílání do všech zemí (dosud je německá, francouzská a italská řeč jako oficiální).

Cílem železničářů-esperantistů v Evropě i na celém světě je dorozumění mezinárodním jazykem esperanto. Sekce IFEF jsou téměř ve všech státech Evropy. Kongresy IFEF se konají pod heslem: „Koleje spojují země — esperanto národy" (La reloj kunligas la landojn, Esperanto la popolojn).

17-tý kongres IFEF byl letos v Norsku ve městě Hamar od 22. do 28. V. V roce 1962 zúčastnili se sjezdu IFEF v Budapešti na pozvání Maďarského železničářského svazu jako hosté také esperantisté z naší dopravy. Sjezd tehdy zahájil maďarský ministr dopravy, esperantista István Kossa.

Českoslovenští esperantisté-dopraváci zdraví esperantisty v ČSSR a v celém světě a přejí si dopisovat, spolupracovat.

Působnost členů ČSEV pro kraje

Výbory některých kroužků a jednotlivci se nás často ptají, kam mají zasílat korespondenci na adresu ČSEV nebo na toho člena výboru, který zodpovídá za příslušný kraj.

V zájmu účelného a operativního řízení naší práce doporučujeme, aby korespondence, týkající se přípravy akcí kroužků v rámci okresu nebo kraje (pořádání kursů, společných akcí více kroužků jako jsou zájezdy, společné porady apod., dále letní tábory a setkání esperantistů, vydávání informačních materiálů pro členy kroužku, prospektů či jiných publikací o městě, závodě, významné události v rámci 20. výročí osvobození, navazování družby apod.) — byla řízena na příslušného člena ČSEV pro váš kraj.

Pokud jde o povolovací a schvalovací řízení, je kompetentní vaše klubové (osvětové) zařízení a příslušné místní, okresní a krajské orgány Národních Výborů. Kopie dopisů členům ČSEV zasílejte předsednictvu ČSEV pro jeho informaci a dodatečné projednání v plénu Výboru, případně za účelem zahájení společné akce s jmenovaným členem ČSEV.

Věci širšího významu nebo takové, jež vyžadují okamžité řešení předsednictvem a plenem, nebo další jednání na centrálních orgánech a institucích, dále plány činnosti a programy EK, zprávy o význačných akcích i výroční zprávy (stručné a věcné!), změny adres funkcionářů, dne a místa schůzek aj. — zasílejte výhradně na adresu ČSEV, Osvětový ústav, Blanická 4, Praha 2., kopii pak k informaci příslušnému členu ČSEV. — Bližší podrobnosti k úkolům a kompetenci ČSEV a jeho předsednictva viz MIMOŘÁDNÉ ZPRÁVY — únor 1965.

FAVORAJ KONDIĈOJ POR ESPERANTO EN ĈSSR

La tuta ĉeĥoslovaka samideanaro kun ĝojo akceptis la sciigon, ke laŭ la decido de la Ministerio por Lernejoj kaj Kulturo konstituiĝis ĉe Kleriga Instituto en Praha
nova Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato.

Same kontentiga estas la fakto, ke por la tutŝtataj laboroj estis elektitaj jam pruvitaj esperantistoj, plejparte kunlaborintoj de la antaŭa ĈSEK, kiuj tre bone konas la problemojn kaj bezonojn de nialanda movado.

La nova ĈSEK kunvenis en Brno la 13-an de februaro en ĉeesto de la reprezentanto de la Ministerio por Lernejoj kaj Kulturo k-do Plicka kaj de la Kleriga Instituto en Praha k-do Stein.

Prezidanto de ĈSEK fariĝis F. Sviták, sekretario de la antaŭa ĈSEK — vicprezidanto A. Ĉambál, prezidanto EK en Martin — sekretario T. Balda, laboranto de iama Asocio. Ĉiuj komitatanoj estas samtempe perantoj por la *koncernaj regionoj*:

Mezbohemia:	František Sviták, Jabloňová 39, Praha 10.
Sudbohemia:	Jana Cířhová, U Svobodárny 12, Praha 9.
Okcidentbohemia:	Tomáš Balda, Řevnice 416/23, Praha západ.
Nordbohemia:	Miloš Hruška, Fučíkova 37, Ústí n. Labem.
Orientbohemia:	Zdeněk Hršel, Ul. 28. října 103, Hradec Králové.
Sudmoravia:	Dr. Ing. Jaromír Šíkula, Palackého 1-3, Brno.
Nordmoravia:	Drahomír Kočvara, Dolní 1, Ostrava 4.
Okcidentslovaka:	Vladimír Lehotský, Sibírska 24, Bratislava.
Mezoslovakia:	Augustín Ĉambál, Holubyho 3/36, Martin.
Orientslovakia:	Michal Kucín, Turgenevova 24, Košice.

Vicprezidanto Ĉambál estas samtempe reprezentanto por la tuta teritorio de Slovakio.

Kiel gvidantoj de la *unuopaj sekcioj* de ĈSEK estis aprobitaj:

MEM — T. Balda, Řevnice 416/23, Praha západ;

Virinoj kaj Radio — J. Cířhová. U Svobodárny 12, Praha 9;

Fervojistoj — Bohumil Král, Komunardů 35, Praha 7;

Sciencistoj — Josef Kavka, Lužná 7, Praha 6;

Arkitektoj — Josef Drn, Šmeralova 10, Praha 7;

Lingvo — Theodor Kilian, Příční 318, Třebíč;

Verkistoj kaj tradukistoj — Ing. E. Felix, U Vinohradské nemocnice 10, Praha 3;

Ĵurnalistoj — A. V. Zedník, Modřany 1482, u Prahy.

Redaktoro de la ĉeĥoslovakaj numeroj de PACO — Ĉestmír Knobloch, Blanická 4, Praha 2, redaktoro de Informoj de ĈSEK, d-ro Ludoviko Izák, Vilao Esperanto, Rastislavova 13, Martin.

La kunsido akceptis *agadplanojn*, 1-e por ĈSEK, 2-e por la Esperanto-rondetoj en ĈSSR. En la enkonduko estas konstatite, ke precipe okaze de la 20-a datreveno de la liberigo de nia Respubliko, ĉiu honesta kaj laborkapabla civitano kontribuos al la plenumo de la taskoj, atendantaj nin ĉe la konstruado de la disvolviĝinta socialisma socio, plifortigo de la politika kaj ekonomia fortoj de nia ŝtato kaj ĉe la sekurigo de la paco kaj progreso en la mondo.

ĈSEK estas konvinkita, ke helpe de la celkonscia gvidado de la Esperanto-rondetoj kaj de la tuta movado, la esperantistoj povos ankoraŭ pli efike kaj pli konvinkige ol ĝis nun manifesti siajn oferemon, konsciiĝon kaj klopodon per tio, ke ili ĉiujn siajn fortojn — ĝuste en tiu ĉi historia epoko de la homaro — dediĉos al la ideoj de la progreso, paco kaj interkompreniĝo, kiuj estas la fundamentaj principoj kaj celoj de la Esperanto-movado ekde ĝia ekesto.

El la konstitua kunveno estis forsendita salutletero al Vjetnamia Pacdefenda Esperantista Asocio kun esprimo de solidareco kaj kun protesto kontraŭ la usona

agreso; plua letero estis sendita al la Federacia Parlamento en Bonn kontraŭ la preskriptiĝo de la militkrimoj, kaj fine, sugesta letero kun enhavo tiusenca al la Germana Esperanto-Asocio.

Ĉar la detala agadplano estis nacilingve multobligita en la speciala eldono de Informoj de ĈSEK kaj en februaro ĉj. al ĉiuj Esperanto-rondetoj dissendita, ni citas almenaŭ la jenon:

ĈSEK instigados la rondetojn, ke ili en interkontakto kun eksterlandaj korespondamikoj kaj organizaĵoj ĝuste ekspliku la porpacan politikon de Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko; la celojn kaj atingiĝojn de nia socialisma socio; la problemon de kunekzistado kaj paca konkurado de du diferencaj sociaj kaj ekonomiaj sistemoj en intereso de pacsekurigo, kaj el tio evidentiĝantan signifon de krea kunlaboro de ĉiuj homoj en la tuta mondo.

ĈSEK helpe de la Kleriga Instituto en Praha en la paso de la jaro kunvokos aktivularkunvenon kun instruado de delegitoj de Esperanto-rondetoj; la komitatanoj persone vizitados la rondetojn por realigi intiman kunlaboron kaj ĝeneraligi la plej bonajn spertojn. — La Komitato kun ĉiuj Esperanto-rondetoj aliĝis al la Jaro de Internacia Kunlaboro kaj tiuflanke organizos ampleksan agadon, en kiu krom amika kontaktiĝo kun diversaj institucioj kaj unuopuloj en eksterlando disvolvos la Subskriban kampanjon; efektivigos ĝemeliĝojn inter niaj kaj eksterlandaj urboj, uzinoj kaj institucioj — iniciatos solenajn aranĝojn okaze de la 20-a datreveno de la fondo de UNO (prelegoj, seminarioj, filmo-kaj teatro-prezentadoj k. a.)

Unu el la plej gravaj taskoj estas aktivigado de ĉiuj konsistaĵoj de la Esperantomovado: rondetoj, kolektivoj kaj unuopuloj, ĝis nun neregistritaj, kun la celo atingi per tio laŭeble plej amasan tutlandan organizon. — La iniciativaj Esperanto-rondetoj helpe de ĈSEK organizos Somerajn Esperanto-Kolegiojn, renkontiĝojn, tendarojn, seminariojn, ekspoziciojn. Ne estu forgesita la sinsekva kolektado de la plej bonaj laborrezultoj de Esperanto-rondetoj kaj ilia publikigado, eldonado de modelaj agadplanoj por la rondetoj, kvaronjara eldonado de informa kaj metodologia helpilo „Informoj de ĈSEK” kaj laŭbezzone ankaŭ de multobligitaj instrumaterialoj. Krom ĉio ĉi dirita estas planata eldonado de informaj materialoj por eksterlando okaze de la gravaj ĉi-jaraj eventoj, kiel ekz. la 20-a datreveno de la liberigo fare de la Soveta Armeo, la III-a Tutŝtata Spartakiado, akcepto de la leĝoj por defendo de la paco kaj kontraŭ la preskriptiĝo de militkrimoj ktp. — plue, eldono de du ĉeĥoslovakaj n-roj de la internacia revuo PACO, dissendata en 40 landojn. kun varia enhavo.

Fine, ĈSEK klopodos efektivigi kaj vastigi la kunlaboron kun Ĉeĥoslovaka Packomitato, kun Ĉs. Virina Komitato, Revolucia Sindikata Movado, Ĉeĥoslovaka Junular-Asocio, turismaj kaj aliaj organizaĵoj.

Jen, la riĉa ĝenerala linio de la agado de la nova ĈSEK, plena de gravaj taskoj, kiujn oni certe kun granda elano efektivigos man- en mane kun la tuta ĉeĥoslovaka esperantistaro kaj en kontakto kaj amika kunlaboro kun la esperantistoj en la mondo. — Multajn sukcesojn!

Esperantigis Eliz

INTERVJUO KUN FRANZ JONAS

Radio Praha, Esperanto-elsendo por Aŭstrio, la 25-an de februaro 1965 en sian programon envicigis aŭkaŭ mallongan intervjuon kun rara gasto de la praga urbodomo, kun viena urbestro — Franz Jonas, kiu kun la tuta delegacio estis akceptita en la historia urbodomo de praga primatoro Černý. Interese estas, ke la urbestro Franz Jonas estas longjara kaj estimata esperantisto. Do redaktoro Zajíček petis lin pri intervjuo, el kiu li eksciis, ke nia ĉefurbo al li tre plaĉis. Urberstro Franz Jonas ĉi-okaze transdonis salutojn por la ĉeĥoslovakaj kaj pragaj esperantistoj. Tralegu, kion ni en la Esperanto-elsendo surbendigis kaj kion aŭdis la aŭskultantaro:

„Jam pli frue mi aŭdis, ke Radio Praha elsendas en Esperanto ĉiumonate. Ĝis nun, bedaŭrinde, mi ne havis okazon kaj tempon ĝin aŭdi. Sed mi havas amikojn, kiuj min pri tio informis. Mi volus eluzi ĉi tiun okazon kaj sendi al esperantistoj en Praha kaj en Ĉeĥoslovakio miajn plej korajn salutojn kaj peti ilin, ke ili ne perdu la paciencon kaj plue laboru por la Esperanto-movado." .

Jana Cíhová.

VÝSLEDEK JEDNÉ ANKETY. Informační odbor UEA zasílá každoročně esperantským organizacím všech zemí dotazník o informační práci, aby byl získán přehled o aktivitě esperantského hnutí ve světě. Také letos obdržel ČSEV tento dotazník a v zájmu zpřesnění a doplnění údajů rozeslal dne 2. dubna m. r. vlastní dotazník s 11 vybranými otázkami na všechny esperantské kroužky v CSSR, které má v evidenci. Ze 130 t. č. registrovaných EK odpovědělo všeho všudy jen 43 kroužků (5 ze Slovenska), některé ještě neúplně. Doplnili jsme došlé údaje podle výstrižkové služby PIS v Praze a pracně kompletovali odpovědi na všechny otázky dotazníku UEA. Výsledek (zúžený) byl otištěn v orgánu UEA „Esperanto“, červenec—srpen 1964. Výsledky za ČSSR, v porovnání s ostatními zeměmi a s přihlédnutím k našim nepříznivým podmínkám v tomto směru, můžeme pokládat celkem za uspokojující.

Zarážející je však liknavost většiny EK vůči této důležité akci UEA a zároveň ČSEV. Domníváme se, že jednou z hlavních příčin je fakt, že většina kroužků nemá informační službu zajištěnou schopným pracovníkem, který by obstarával styk s redakcemi časopisů, rozhlasem i různými institucemi a měl by zároveň stálý a úplný přehled o výsledcích publikační a informační práce „por kaj per Esperanto“ v obvodu svého kroužku. Pak tato činnost probíhá slabě a živelně, výsledky nikdo neeviduje a v případě potřeby lze je těžko dát dohromady. Sv

MEZINARODNI VÝSTAVA DOPRAVY V MNICHOVĚ 25. 6.-3. 10. 1965. Pořadatel Internationale VerkehrsAusstellung, Theresienhöhe Nr. 13, 8 München 12 zašle na požádání bezplatně několikabarevnou skládačku s esperantským textem.

ROK MEZINÁRODNÍ SPOLUPRÁCE — PODPISOVÁ AKCE. Podle informací sekretariátu UEA je současný stav podpisů neuspokojivý. Jelikož do října 1965 bude nutno shromáždit nejméně jeden milión podpisů, obrací se UEA na všechny, aby své úsilí zvýšili tak, aby do stanoveného data bylo dosaženo tolik podpisů, aby návrh, který bude předložen OSN, se setkal s úspěchem.

Formuláře podpisových archů s českým překladem textu „Návrhu“ jsou dosud k dostání u Esperantského klubu při Parku kultury a oddechu, Ul. 28. října č. 103, Hradec Králové.

ANKETA: ESPERANTSKÉ ULICE. Informační služba Italské Esperantské Federace, která z pověření UEA sestavuje a upřesňuje seznam míst s esperantskými ulicemi, náměstími aj., se na nás obrátila s požadavkem, abychom jim oznámili všechna místa v ČSSR kde jsou ulice, náměstí apod. nesoucí název **ĜESPERANTO** nebo Dr. Zamenhof, případně takové označení, jež má vztah k esperantu. Žádáme proto výbory kroužků, aby nám pokud možno urychleně zaslaly zprávu v tomto smyslu ze svého místa nebo okolí. Dosavadní seznam, který je v současné době k dispozici, neodpovídá současnému stavu.

Ještě k „propagandě“. „Je nežádoucí vnucovat se jako esperantista, je však třeba vytvořit všepřecně příznivé ovzduší k účinné práci pro esperanto. Neschvalujeme přílišné užívání odznaků a hesel. Tím docílíme leda pravého opaku. Důležité je nejednat jako podivín. Žel, publikum často věří, že esperantisté jsou členy některé sekty.“

(Prof. Ivo Lapenna v úvodu k zasedání pracovní sekce o aplikaci nových metod informace) —5/8 64.

o. k.

PROHLÁŠENÍ O ESPERANTIZNIU

(Zkráceno)

První mezinárodní konference esperanta v roce 1905, podle návrhu dr. Zamenhova přijala „Prohlášení o esperantismu“, jehož podstatným obsahem jest:

— Esperantismus usiluje o rozšíření neutrálně lidského jazyka v celém světě, který by umožnil lidem různých národů vzájemně se dorozumívat, aniž by se mísil do vnitřního života lidu, a nijak nesledoval vytlačení existujících jazyků národních. Aby sloužil jako jazyk k sblížení u veřejných institucí v těch zemích, kde jsou jazykové rozdíly mezi různými národy; a ve kterém by mohli být uveřejňovány spisy, mající sloužit společným zájmům všeho lidu. Každá jiná myšlenka a naděje, kterou ten neb onen esperantista spojoval s esperantismem, je jeho čistě soukromou věcí, za kterou esperantismus nezodpovídá.

— Dosud ze všech návrhů na světový jazyk jenom esperanto je dostatečně prověřeno jako vhodný, a proto přátelé mezinárodního jazyka seskupili se všichni kolem tohoto jazyka.

— Autor esperanta se zřekl všech práv na tento jazyk, tedy celý svět je materiálním hospodářem jazyka.

— Základ esperanta (Fundamento de Esperanto) je závazný pro každého esperantistu, a nikdo není oprávněn jakkoliv ho změnit.

— Esperantista je každý, kdo zná a užívá jazyka esperanto, lhostejno, k jakým cílům ho užívá.

(Z „Hungara Esperantisto“ — červen 1964 — přeložila Jana Cíhová)

Recenzoj

„AŝMA“ — rakonto en versoj — tradukita el la lingvo sania; esperantigis Laŭlum, ilustris Huang Jongju. Eldonis Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino 1964.

Aŝma estas tradicia rakonto de sanioj, branĉo de Ji-nacio, nacimalplimulto en sudokcidenta Ĉinio, sudoriente de Kunming, la ĉefurbo de Junnan-provinco. La versaĵo priskribas kamparanan junulinon Aŝma kaj ŝian fraton Ahej. Ĝi rakontas pri la lukto de Aŝma kontraŭ la despota bienulo Rabubala. La gejunuloj reprezentas la sopiron je la libero kaj feliĉo de la tuta sani-popolo, suferinta multflanke en la pasinteco.

J. C.

To Huu: Elektitaj Poemoj. Traduko de Dao Anh Kham ilustraĵoj de Diep Minh Chau; eldonis Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio, 1964.

To Huu naskiĝis en la jaro 1920 en Hue (Centra Vjetnamio). Lia poezio servis al la vjetnama revolucio post 1937: kontraŭ la koloniismo franca, faŝismo japana kaj imperiismo Usona. La poetobatalanto, agante meze de la popolamaso kaj spertinta ĉiajn suferojn de senpatruja civitano, ekiris la rektan vojon: „Per leviĝo, sklavo, rompu la mizeron!“

La arda poezio de To Huu harmonie subtenas la lukton de la popolo pri la libereco kaj unuigo de la Sudo kaj Nordo. Li vekis fidon al la estonteco de la nacio, post 1954 al la konstruado de socialismo en la Nordo, al la reunuigo kun la Sudo. La belo jam ekfloras en la libera Nordo. Kiam temas pri Sudo, la poezia tono estas kortuŝa, bolanta de malamo. Tiajn poemojn oni devas legi kaj relegi: ili ja koncernas ĉiujn humanajn homojn.

J. C.

Konciza geografio de Ĉinio. Formato 13 X 18,5 cm, 240 tekstopaĝoj, 5 etaj landkartoj, 15 fotoreproduktitaj presbildoj. — La aŭtoro Jen Judi, en du partoj facilforme donas ĉiujn plej pravajn informojn pri Ĉina Popola Respubliko. La unua parto sur 61 paĝoj en 6 ĉapitroj enhavas jenajn titolojn: Lando kaj popolo, Topografio kaj mineraloj, Klimato kaj vegetaĵoj, Riveroj kaj lagoj, Maroj, Agrikulturo, Industrio kaj komunikado. — La dua parto en sep ĉapitroj detale proksimigas la unuopajn provincojn, enkalkulite la ĉefurbon.

Ĉiu geografo daŭre sentas la nesufiĉon de la faka literaturo pri tiu ĉi grandega lando, kies ĝenerala signifo kaj politika graveco kreskas responde al la diligenteco kaj konstru-tendencoj de la 650 miliona loĝantaro. Sed la libron kun intereso legas ankaŭ laiko, ĉar ĝi estas skribita entute en klara kaj komprenebla lingvo, kvankam ie-tie la geografiaj nomoj ne konformiĝas al la preciza senco de Esperanto, kion oni povas senkulpigi per tempomanko kaj neeblo konsulti diverslandajn fakulojn (pĝ 235). Eble el tiu ĉi vidpunkto oni povas pardoni la lingvajn erarojn kaj nekutimajn esprimformojn. Sed tiuj ĉi negravaj mankoj ne malgrandigas la utilecon de tiu ĉi libro, kiun oni vicigu inter bonajn verkojn de la faka esperantlingva literaturo. -jelĉ-

Esperanta urboprospekto — duobla sukceso! La urbo Kronach, post persvado de la urbestraro fare de la tieaj esperantistoj, eldonis al la urboprospekto ankaŭ esperantlingvan almetaĵon. La sukceso estis duobla. El ĉiuj partoj de la mondo venis petoj kaj oni devis forsendi jam pli ol 2000 ekzempleroj da Esperanta prospekto. Kvankam la urbestraro komence estis kontraŭ la eldono, nun oni estas feliĉa pro la bona sukceso kaj konvinkita pri la utileco de Esperanto. Ĝi signifas, nature, ankaŭ sukceson por la lokaj esperantistoj. — La prospekto estas senpage ricevebla ĉe Verkehrsbüro der Stadt Kronach, 864 Kronach (NSR — Okcidenta Germanujo).

M. Šaturová-Seppová: ROZPRÁVATE po ESPERANTSKY? (stran 144, cena 7,— Kčs váz., vydalo Slovenské pedagogické nakladatelství v Bratislavě 1965. Náklad 5.100 výtisků).

Slovensko-esperantská konversační příručka, zpracovaná podle slovenského standardního textu, obsahuje výrazy pro nejrůznější příležitosti v denním životě, na př. ve společnosti, v kultuře, v turistice, v dopravě, ve sportu atd., dále údaje o Československu, o esperantském hnutí a j.

SZOLNCK (Hungario) — 12-paĝa faldfolio kun 12 fotografaĵoj kaj kun skizo de la urba tereno, indikanta la pli gravajn konstruaĵojn kaj entreprenojn. — Informdeĵoro: Fremdul-trafika Oficejo Departementa, Szolnok, Kossuth-placo 6.

BRIDLINGTON. 4-paĝa faldfolio kun 12 fotoj, la kolorigita sur la fruntpaĝo montras la marbordon kun ora sablaro, sendanĝera banado kaj bela pejzaĝo. — Informoj: Garrison Street, BRIDLINGTON, YORKSHIRE, Anglujo.

LA MORTO DE JANKIO

Rakontoj pri Sud-Vietnamio, Fremd- lingva eldonejo en Hanojo, 1964, paĝ. 127.

Denove aperas en Esperanta versto — jam la duan fojon en la lasta jaro — viva atesto pri la lando nune pli ofte preparolata. Vid-al-vide de ĉiutagaj samtempaj okazintaĵoj, la vietnamaj aŭtoroj nome Van Ngok, Giang Nam, Fam Ho, Tran Dinh, Fam Huu Tung kaj Huyen Ku traktas historiajn eventojn enlandajn. Oni jam ne gvidas militon sole per armiloj, oni jam ne taksas nuran fizikan venkon. La morala bazo estas la moviga faktoro prospere al la batalanta popolo. Ankaŭ la titola rakonto „La morto de Jankio” estas specimeno de tiu nova kompreno de la malamika militantaro jankia, kiu fariĝas viktimo de la „nerva milito”. Fine klariĝas, ke „la

grandaj misteroj de tiu lando superis l i a n komprenpovon. Li komencis duonvidi ilin, ĝuste kiam li kuŝiĝis sur tiu tero por neniam plu leviĝi." Estis jam tro malfrue, sed same estas necese konkludi tiamaniere. O. Kníchal.

LETNÍ TÁBOR: Stříbrná zátoka na Vranovské přehradě v dnech 18. července až 14. srpna 1965. Branné prvky, sportovní soutěže, kursy esperanta, koupání, společenské hry, výlety.

TÁBOR BUDE ROZDĚLEN NA DVA BĚHY

1.běh: 18. července-31. července,

2.běh: 1. srpna-14. srpna.

Humor, zpěv a vyprávění v dýmu táboráku jsou na programu. Ubytování bude ve stanech po dvou osobách a menší počet v prosté chatě. Strava bude podávána pětkrát denně.

Každý účastník je povinen dodržovat táborový řád, pravidelně navštěvovat některý z kursů esperanta a podrobit se závěrečné zkoušce. Kurs bude rozdělen na skupiny A-začátečníci, B-pokročilí, C-konverzační, D-pro kandidáty učitelství.

V programu každého běhu je celodenní výlet do Lednice nebo Mikulčic, kulturního památníku ze slavné doby Říše velkomoravské a polodenní výlet na zámek Vranov a hrad Bítov.

Celkový pobyt v jednom běhu stojí 280 Kčs včetně kursového, pro mládež do 15 let 250 Kčs.

Z pověření Čs. esperantského výboru tábor uspořádá: Dům pionýrů a mládeže Gustava Klimenta v Třebíči, Klub esperantistů při Osvětovém domě B. Václavka v Třebíči, za spolupráce ZO Svazarmu při OD B. Václavka v Třebíči.

T ř e b í ě. La preparaj laboroj por la 14-a Somera Esperanto-Tendaro bone progresas. Vere ĝojiga estas la intereso, kiun montras nia Esperanto-publiko al tiu ĉi jam tradicia plej malmultekosta refreŝiĝejo. Aliĝoj alvenadis tre frue, do nekutime baldaŭ kompare kun la pasintaj jaroj. La programo certe kontentigos ankaŭ nunjare la tendaranojn: antaŭtagmeze serioza laboro en kursoj por komencantoj, progresintoj kaj estontaj Esperanto-instruistoj, posttagmeze banado, ludoj kaj ekskursoj en la romantika ĉirkaŭaĵo, vespere kantoj, humoro kaj babilado en la fumo de la tendarfajro. Kiu serĉas sunon-akvon-arbarojn, tiu trovos ilin en la Arĝenta Golfo ĉe la valbaraĵo de Vranov-Lančov. La nombro de la tendaranoj estas limigita. La kotizo por la 14-taga kurso, loĝo en tendo aŭ kabano kaj manĝo faras Kčs 280,—, por la junularo Kčs 250,—. Gesamideanoj, kiuj volus kaj kapablus instrui en iu el la kursoj, faru vian proponon al la preparkomitato de SET.

Třebíč. Ki

PŘÍSPĚVKY PRO ZPRÁVY ČSEV upravujte tak, jak jsou obvykle otiskovány ve ZPRÁVÁCH. Orig. příspěvky nutno psát na stroji, na tužším papíru s jednou kopií, obrádku s většími okraji, po jedné straně papíru — 30 řádek na stránku, 70 úderů v jedné řádce. Jde-li o příspěvek, který má být otištěn v esperantu, připojit dvojmo překlad. Předběžnou jazykovou korekturu necht' předem provede druhá osoba, znalá dobře esperanta i národního jazyka. Takto upravené příspěvky zasílejte přímo na adresu redakce ZPRÁV: Dr. L. Izák, Martin, Rastislavova 13, Vilao Esperanto.

LA SPARTAKIADOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO

La Spartakiadoj reprezentas en Ĉeĥoslovakio vastan bazon kaj pli ol centjaran tradicion de fiz — kaj sportkulturo en nia patrujo. Jam la granda filo de nia popolo, la mondfama pedagogo Jan Amos Komenský-Comenius en sia verkaro emfazis la signifon de la fizkulturo, kiel gravan faktoron de la homara eduko.

Liaj principoj estis respektataj ankaŭ de la fondintoj de la bone konata ĉeĥa organizaĵo SOKOL, D-ro Miroslav Tyrš kaj Jindřich Fügner. La Sokol-prezentiĝoj ĉiam estis granda fizkultura evento en Ĉeĥoslovakio, la aktiveco en tiu ĉi organizaĵo solidigis la nacian konscion de Ĵia membraro.

Antaŭ la dua mondmilito en la ĉeĥoslovaka fizkultura movado grave rolis la Federacio de Laborista Fizkulturo, kiu koncentris en siaj vicoj la plej progresemajn entuziasmojn de la movado en niaj landoj. La Unua Spartakiado, aĵasa prezentiĝo de gimnastoj de la Federacio okazis en jaro 1921. La nomon Spartakiado kaj ĝian efektivigon preparis J. F. Chaloupecký, gvidanta aganto de tiu ĉi organizaĵo. La nomon li proponis laŭ la ribelestro de romiaj sklavoj.

Tiu ĉi 1-a Spartakiado estis granda evento kaj malgraŭ la obstakloj oficialaj kaj de la dua Laborista Fizkultura Organizaĵo (socialdemokrata) oni sukcesis dum kelkaj tagoj per la oferemo de la movado prepari la necesajn spacon, stadionon sur la ebenaĵo Maniny, same ankaŭ organizi la alveturon de la partoprenintoj al Praha kaj ĉion alian. La tiaman prezentiĝon spartakiadan ĉeestis centmil spektantoj, ekzercadis pli ol dekmil gejunuloj kaj proksimume 14 000 viroj kaj virinoj.

La fame konata Spartakiado sur ebenaĵo Maniny kaj la aliaj pluaj en pli postaj jaroj kreis en nia popolo solidan bazon por la tradicio de la amasfiz-kultura movado.

Grandiozan eksvingon atingis la ĉeĥoslovaka fizkulturo post la dua mondmilito, post liberiĝo de niaj landoj. En favoraj kondiĉoj de la nova sociaranĝo la fizkulturo kaj sporto fariĝis ĉe ni vera amasmovado. Estis unuigitaj la sport- kaj fizkulturaj organizaĵoj, kaj kreitaj ĉiuj kondiĉoj por tio, ke en sana korpo estu sana spirito ĉe la popolo.

La Spartakiadoj do manifestas amasan bazon de fizkulturo kaj tradicio en tiu ĉi movado. Jam la unua Spartakiado Tutŝtata en 1955 kaj la dua en 1960 impresigis ĉiujn partoprenintojn same kiel la organizantojn kaj spektantojn neforgeseble. La Spartakiadoj ne estas nur grandioza nacia sportfesto, ili estas la evento, kiu eĉ en eksterlando inter la sportistoj kaj belecadorantoj trovis fortan ehon. Kaj nun jam miloj el ĉiuj kontinentoj alveturos por ĝui la prezentiĝojn de niaj gimnastoj.

Por ĉio ĉi ni havas ja favorajn kondiĉojn kaj rimedojn: la stadionon al la amasprezentiĝo por 250 000 spektantoj, kie samtempe povas prezentiĝi eĉ 32 000 gimnastoj. La Stadiono situas proksime de Praha Kastelo, nomiĝas Strahov-Stadiono, kaj estas la plej granda siaspece en la tuta mondo.

La ĉi-jara III-a Tutŝtata Spartakiado denove estos granda evento. Ĝi okazos ekde la 28-a de junio ĝis la 4-a de julio, kiam la fermon de la solenaĵoj kreos giganta marŝo de sportistoj kaj gimnastoj tra Praha. La tagoj estos manifestantaj la ĝojon, belon, kaj prave ili estos parto de niaj tutjaraj celebradoj okaze de la dudeka datreveno de liberiĝo de la Respubliko el sub la Hitlera okupacio, kaj de la fino de la dua mondmilito.

J. C., + HF.

Eltirajo el Esperanto-elsendo de
Radio Praha, la 29-an de aprilo 1965.

Aby si lidé rozuměli

(„Lidová demokracie“ ze dne 10. 1. 1965, zaslal Fr. Jakubec, Brno.)

Při nástupu do nového roku jsme bilancovali, zvažovali činy a skutky a umiňovali si každý, čeho se vystříháme, co budeme dělat lépe, jak zlepšíme vztahy mezi nejbližšími doma i na pracovišti, že se neutrháme na nikoho ani ve vlaku, ani na ulici, neboli všude přece žijí lidé. Také UNESCO vyhláší rok, do něhož jsme právě vstoupili, za Rok mezinárodní spolupráce. Ostatně čilejší mezinárodní turistický ruch si to vynucuje. Lidé v cizích zemích nehledí jen na památky a krásy, poznávají i vlastnosti národů. Už loni navštívilo mnoho našich občanů cizí země, odkud si však

skoro všichni odnesli jeden více-méně problematický zážitek: jazykovou nesnáz. Mnozí si učinili sice po návratu ze svých jazykových potíží terč zdařilých i méně působivých vtipů, anekdot, ale dorozumívat se posuňky a rukama i v nejzákladnějších projevech není jistě důstojné člověka atomového věku a cest k nebeským tělesům. Jazykový problém tíží lidstvo vlastně už staletí. I Učitel národů J. A. Komenský radil utvořit nový jazyk, který by nikoho nepovyšoval a neponižoval a jemuž by se mohli naučit všichni lidé vedle své matěštiny. Svěho času byla důležitým mezinárodním pojítkem latina. Dnes však už pro moderní vyjadřování nestačí, a tak se ji používá jen v úzce specializovaných oborech. Zhruba před osmdesáti lety vznikl nový mezinárodní jazyk esperanto. V náročnosti obstálo a tak se stále rozširuje. Má tedy určité předpoklady vyřešit jazykový problém lidstva. O ekonomických výhodách jediného jazyka — od turistiky až po mezinárodní odborné sjezdy, vydávání vědeckých knih a časopisů — není nutné se jistě zmiňovat. Umožnil by i lepší dorozumění národů a usnadní cestu k upevnění světového míru. Esperantisté navrhuji, aby Organizace spojených národů řešila jazykové potíže lidstva účinnější podporou šíření neutrálního mezinárodního jazyka esperanto. Snad by to tedy za zkoušku stálo.

ESPERANTSKÁ KOMISIE PRO MEZINÁRODNÍ STYKY V ARMÉNII.
Arménská společnost pro přátelství a kulturní styky ustavila Esperantskou komisi pro zahraniční styky, jejíž cíle jsou následující:

1. Uskutečňovat styk se zahraničními esperantskými organizacemi a jednotlivci za účelem informací o Arménii, jejím lidu, zemi a kultuře;

2. Kulturním, mírovým, vědeckým a jiným spřáteleným organizacím a redakcím dodávat bezplatně různé články, fotovystavy, alba, gramofonové desky a jiný materiál o Arménii;

3. Vítat zahraniční esperantisty, hostující v zemi a zajistit jim tlumočnický.

Předsedou komise je Akademik prof. dr. Gurgen Sevak. Adresa: AOKS, Esperanto-Komisiono, Str. Abovjan 3, EREVAN, ARMENIO — SSSR.

La 18-a KONGRESO DE JUGOSLAVIAJ ESPERANTISTOJ okazis en Rijeka la 5-8. de julio 1964.

FORLISIS NIN MILOŠ JONÁŠ

En marto ĉi-jara subite mortis post longdaŭra kormalsano, en sia 77-a vivjaro, modesta, silente suferanta homo, sed fervorega esperantisto, Miloš Jonáš.

En 1955 li malsaniĝis je korinfarkto kaj devis forlasi la postenon de laboranto en „Societo por Hemia kaj Metalurgia Produktadoj“. La malsano limigis lian irkapablon tiagrade, ke li devis preskaŭ senĉese restadi hejme. Tamen li nek malesperis, nek rezignis. Laŭ sia sanstato li pli-malpli fervore, sed persiste kompiladis, prilaboradis diversajn esperantlingvajn instrumaterialojn kaj helpilojn. Ĉion li mem maŝinskribis kaj aranĝis tre zorge kaj nete. Bedaŭrinde liaj instrutekstoj estis pretigitaj nur en kelkaj ekzempleroj kaj cirkuladis nur inter liaj plej intimaj konatoj-esperantistoj.

Li verkis atendante nenian rekompencan, ĉar laŭ lia konfeso Esperanto fariĝis por li vera medikamento!

Li abonadis multajn esperantlingvajn gazetejn kaj kiel ano de Esperanto- Klubo de Kleriga Societo en Praha-2, li diligente uzadis ĝian riĉan bibliotekon. Nature, ankaŭ li mem posedis Esperantan bibliotekon, kiun li kompletigadis.

Li korespondadis ne nur kun unuopuloj, sed ankaŭ kun Esperanto-rondetoj ĉeĥaj kaj slovakaj, helpadante al ili ofereme kaj ĝoje kun firma espero, ke Esperanto fine venkos.

Sub lia patroneco kaj kun sindona helpo (valoraj konsiloj, spertoj kaj liaj

instrumaterialoj) en la lasta jaro de lia vivo estis fonditaj en la urbo Hořice 3 Esperanto-rondetoj.

Lia verko estas 5-volumeta maŝinskribita „Praktika Konversacio“, kies 1-a volumo estis en 1961 aperigita en la bulteno de Esperanto-rondeto en Martin. (La ceteraj kuŝas en manuskripto).

Miloš Jonáš restos en la memoro de la ĉeĥoslovaka esperantistaro kiel ekzemplo de modesta, neprofitema, fidela esperantisto, klopodanta eĉ spite la gravegan malsanon kontribui al la vastigado kaj perfektigado de la uzo de Internacia lingvo. Kvankam korpe malforta, per siaj eminentaj kaj neeĉerpeblaj kapabloj kaj volo li marŝis en la unuaj vicoj de la batalantoj por la tutmonda paco. Eliz

K 1. výročí smrti prof. dr. H. Yagiho

Dne 6. května 1964 zemřel významný lékař a esperantský pracovník prof. dr. Hideo Yagi. Byl vynikajícím odborníkem v gynekologii a porodnictví, kromě toho během posledních dvou let svého života zastával funkci předsedy Světové esperantské asociace, jejíž sídlo je v Rotterdamu.

Byl to sympatický a ušlechtilý vědec, plně se věnující zájmům lékařství i rozvoji mezinárodního jazyka esperanto, pro nějž pracoval od svých studentských let. Náhlý záchvat srdeční mrtvice jej přinutil přerušit svoji činnost ředitele ústavu Kawasaki pro léčení rakoviny v Okajamě a současně odstoupit z funkce předsedy UEA. Osud tak nedovolil, aby on, jako první asijský předseda v historii UEA viděl uskutečnění prvního světového kongresu esperantistů na půdě Asie, který se bude konat začátkem srpna v Tokiu a o nějž se již mnoho let tak nadšeně přičiňoval.

Hideo Yagi se narodil blíže Osaky 18. srpna 1899 a naučil se esperantu v roce 1917. Jako student založil esperantský klub v Kiotu a současně založil a řídil jeho ilustrovaný časopis Libereco (SVOBODA). Ještě v době studia medicíny napsal a vydal japonsko-esperantský slovník, učebnici esperanta a brožuru o jazykových otázkách v japonštině. V pozdějších letech uveřejnil řadu původních článků v mezinárodním jazyce o lékařství. V roce 1934 se stal profesorem gynekologie a porodnictví na universitě v Okajamě, kteroužto funkci zastával 28 roků. Již v r. 1937 se zúčastnil Světového esperantského kongresu ve Varšavě, kde i přednášel.

V posledních letech se stal místopředsedou Mezinárodní federace gynekologů a porodníků, předsedou Asijského gynekologického svazu, rektorem Okajamské university a předsedou Světového esperantského svazu, po smrti Itala Giorgia Canuta.

Jeho odchod znamená velkou ztrátu jak pro lékařství tak pro mezinárodní jazyk.

(Podle UEA)

Důležitý úkol EK!

Žádáme esperantské kroužky, aby si vedly od poč. roku 1965 přesný a úplný *přehled o návštěvách zahraničních hostů* — esperantistů. Zaznamenávajíte si všechny zahraniční návštěvy, které přijdou do Vašeho kroužku, místa (města), i k jednotlivcům *prostřednictvím esperanta*, pozvané i náhodné, jimž byly poskytnuty jakékoliv služby při jejich cestě do ČSSR, ubytování, doprovodu a podány informace vč. různých esperantských (i jiných) informačních materiálů. — Vedením přehledu pověřte člena vašeho pracovního výboru, který má na starosti informační službu (Informa Fako).

K 30. září 1965 podejte nám souhrnné hlášení na samostatném listu s těmito údaji:

Jmenný: seznam, počet dnů pobytu u vás, země (stát), druh návštěvy (turistická, III. CS, odborná, konference, kulturní ap.).

Tyto informace nám poslouží v celku jako jeden z dokladů o uplatnění esperanta v turistickém i jiném osobním mezinárodním styku s ČSSR. Záleží proto velmi na tom, aby údaje byly úplné a hodnověrné. Významné návštěvy v hlášení blíže komentujte.

PŘÍLEŽITOSTNÁ NÁLEPKA s heslem „Rok mezinárodní spolupráce 1965 — Rok mezinárodního jazyka Esperanto”. — Vydal ji UEA. Cena: 0.40 glđ (1.6 stel, nebo 1. rpk) za každý aršík po 10 kusech.

Memore al Ján Valaš'an Dolinský

Plej kruela nemeritita sorto: suferiga nekuracebla malsano forrabis nian karan „JVD” la 2-an de marto ĉi-jara en lia 73-a vivjaro.

Post febroj kaj konsumigo sukcesis la senkompata malsano haltigi la batadon de la koro de nobla homo, emerita instruisto kaj lernejdirektoro, ĝis la malsaniĝo aktiva muzikkomponisto, iam eĉ horestro, Esperanta poeto, tradukanto de slovakaj popolkaj artkantoj, de poeziaĵoj same kompetente kiel de prozaĵoj, ĉu specimenaj fragmentoj, ĉu romanoj. Pro liaj meritoj sur la kampo de muziko distingis lin la Prezidento de la Respubliko per la honora titolo: „Pro eminenta laboro”.

Lian forpason plej profunde bedaŭras precipe la Esperanto-rondeto en Martin, kies ekstera membro kaj daŭra kunlaboranto li restis ankaŭ post sia translokiĝo en la urbon Hlohovec. Li ja estis la unua prezidanto de la iama Esperanto-grupo en Martin kaj honora prezidanto de Slovaka Esperanto-Societo, krome ankaŭ prezidanto de la tiama Slovaka Esperanto-Instituto en Martin, por kies bezonoj li kompilis gramatikon kun simbola titolo „Fenestreto en la mondon” kaj Esperantan-slovakajn kaj Slovakajn-Esperantan vortareton. En Esperantisto Slovaka, ĝia organo, li aperigis prilingvajn artikolojn, tradukojn de popolkantoj kun muziknotoj, ja eĉ proprajn eminentajn poeziaĵojn.

Krom tio li kontribuadis al diversaj eksterlandaj esperantlingvaj gazetoj kaj revuoj per artikoloj prilingvaj, primuzikaj k. s., ĉar — kiel li skribis al ni — li konsideris sia devo zorgi pri la ĝusta uzado de la Internacia lingvo kaj atentigadi pri la eraroj ĉu enaŭ eksterlandaj publikaĵoj, kiuj lin atingis.

Li bone konis la historion de la monda Esperanto-movado, do li povis ekparoli kompetente ankaŭ ĉi-rilate. Lia riĉa arkivo entenas kopiaĵojn de multegaj manuskriptoj, senditaj ĉiudirekten kaj aperigitaj. Inter liaj ĝis nun ne publikigitaj tradukaĵoj troviĝas dekduo da titoloj de Slovakaj kaj Ĉeĥaj verkistoj, enkalkulante la historian romanon Adam Sangala de D-ro Ladislao Nádaši kaj la amosentan romanon Tri kaŝtankoloraj ĉevaloj de Margita Figuli. Kaj oni povas nur miregi pri la riĉega listo de liaj aperigitaj tradukaĵoj kaj originalaj artikoloj. — Li recenzadis aŭ kritikadis same la nacilingvajn kiel la esperantlingvajn, precipe porjunularajn kantaretojn kaj provojn; li zorge aŭskultadis la prononcadon de la radioparolantoj. Li do estis nia konscienco. Malgraŭ sia — eĉ post la pensiigo — troa okupiteco kaj grava miopeco, li ĉiam konfirmis kaj prirespondis ĉiun en- kaj ekster-landan leteron, petantan pri konsilo, kritiko, korekto, informoj k. s.

Li estis tre kompleza, sed ankaŭ tro modesta homo. Li ne volis esti menciata, solenata, laŭdata. Li uzis entute 9 pseŭdonimojn, ĝis fine li restis ĉe la mallongigo JVD.

La slovakaj Esperanto-movado perdis en li sian polihistoron (multfakulon) kaj la tuta esperantistaro de nia Respubliko fervoran kunlaboranton sur la porpaca verda kampo.

Martin Benka, nacia artisto, D-ro Ludoviko Izák

AGADO DE ESPERANTO-RONDETOJ EN 1964

BRATISLAVA. Kvankam Esperanto-rondeto ĉe Urba Kleriga Domo ĉesis ekzisti, ĝiaj anoj daŭrigis la laboron, kolektive preparadante Konversacian Manlibron, mezgrandan Vortaron kaj Lernolibron Esperantajn-slovakajn. La helpiloj estas aperontaj en 1965. — La Naturscienca Fakultato de Universitato de Komenský

organizis kvar kursojn kaj fondis E-rondeton.

BARDEJOV. Esperanto-rondeto ĉe Kulturdomo kunvenadis ĉiumerkrede je la 19-a horo kaj okazigis du Esperanto-kursojn por la junularo. Oni ekkontaktis kun polaj esperantistoj, loĝantaj proksime de la landlimo.

BRNO. Esperanto-Klubo ĉe Parko de Kulturo kaj Ripozo kunvenadis ĉiumarde je la 19-a horo en Hotelo Slovan, Lidická 23 kaj laboras diligente kaj modele. Por siaj proksimume 400 membroj ĝi eldonadas ciklostilitan bultenon, enhavanta Esperant-kaj naciligvajjn sciigojn pri la plej gravaj okazaĵoj ne nur el la kluba, sed ankaŭ el la internacia Esperanta vivo. Aldone estas aperigata programo por ĉiu kvaronjaro, entenanta la datojn de la okazontaj prelegoj kaj aranĝoj, inter kiuj estas aparte menciataj la artaj prezentadoj, pri kiuj zorgas eminentaj operkantistoj-esperantistoj. — La klubo tradukis kaj dissendis la publikaĵon de Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj „Granda Moravio”, kiun PKO eldonis okaze de la 1100-a datreveno de la alveno de la fratoj Cirilo kaj Metodio en Moravion. Amaso da dankleteroj al PKO atestis pri bone farita laboro kaj pri la granda intereso, vekita en eksterlando helpe de Esperanto.

GOTTWALDOV. Esperanto-rondeto ĉe PKO (Potoky 25, Gottwaldov I) kunvenadis lunde je la 19.30. La 15-an de junio ĝiaj anoj partoprenis la renkontiĝon de esperantistoj en Poděbrady, la 29-an de junio la renkontiĝon kun polaj esperantistoj sur la monto Cantoria en Bezkydy-montaro, krome ankaŭ la renkontiĝojn en Olomouc (6. IX.) kaj en la slovakia urbo Žilina (16. IX.) — Dumsomere, en kunlaboro kun PKO ĝi aranĝis sukcesan ekspozicion de infandeseĝnaĵoj el la tuta mondo (entute 300) sub la moto: „Ĉiuj infanoj de la mondo por la daŭra paco!” — Krome okaze de vizitoj de eksterlandaj gastoj oni helpis al ili ĉiurilate kaj merite de PKO ĉiuj ricevis memoraĵojn. La korespondado kun eksterlando estis en 1964 tre vigla. — Okaze de la subskribkolektado por UNESCO en la 1-a etapo estis akiritaj 1200 subskriboj. La rondeto kunlaboris kun la urbaj propaganda kaj turisma fakoj.

KOŠICE. La 14-an de aŭgusto 1964 prelegis esperantlingve s-ro Peter van Bentum el Hago, Nederlando, en Metalurgia Konstruejo nacia entrepreno en Košice, je la temo: „Unu miliono da postmilitaj loĝejoj en Nederlando”. La prelego estis akompanata per filmo pri domkonstruado en Nederlando, speciale por ĉi tiu prelego pruntedonita de la Nederlanda Ministerio pri Domkonstruado. Ĉeestis proksimume 60 konstru-teknikistoj; interpretis Ing. J. Werner.

MARTIN. El la aranĝoj de E-rondeto ĉe Uzina Klubo de Revolucia Sindi- jec, ankoraŭ ne estis menciita la granda ekspozicio, aranĝita kune kun tiuj de la filatelista, marioneta, amatora-teatra, danc- kaj ĵazorhestra rondetoj de la Uzina Klubo, vekinta grandan surprizon kaj interesiĝon de la neesperantista publiko. — En kunlaboro kun la Esperanto-rondetoj en Jihlava estis eldonitaj tri numeroj de „Esperanto-Agado Martin—Jihlava” (la lasta kun duobla amplekso). — La rondeto presigis korespondmaterialojn kun teksto Esperanta-slovaka.

Du reprezentantoj de la rondeto kune kun la reprezentantoj de la Uzina Klubo — vizitis la urbon Jihlava kaj la tieajn Uzinan klubon kaj Esperanto-rondetojn. — La rondeto kunlaboris kun Matica slovenská — Slovaka Nacia Biblioteko pri la preparata memorlibro „Historia Jaro”, entenonta artikolojn, salutleterojn kaj fotografiaĵojn pri la solenaĵoj okaze de la 100-jara datreveno de la fondo. — La rondeto kunlaboris kun Di- liza en Bratislava ĉe dissendo kaj disvendo de la esperantlingva eldono de „Meteoro” de Petro Karvaš. — Por Radio Praha, Esperantaj disaŭdigoj por Aŭstrujo ĝi peris la intervjuon kun artpentristo kaj esperantisto Martin Benka, nacia artisto, portante de Ordeno de la Respubliko. — En kadro de la

subskrib-kolektado por UNESCO la rondeto akiris amason da subskriboj ne nur de unuopuloj, sed ankaŭ de ĉiuj institucioj kaj lernejoj (mez- kaj altgradaj), jam uzantaj aŭ favorantaj Esperanton. — La 22-23-an de aŭgusto, por soleni la 20-an datrevenon de la Slovaka Nacia Revolucio, estis okazigita renkontiĝo de esperantistoj, kun Esperanta akademio, trarigardo de la urbo kaj de la konstruata nova Uzina Klubo, fine kun vizito de la memorindaj lokoj de la Revolucio, en la ĉirkaŭaĵo. Estis projekciata ankaŭ filmo pri kapitano Nálepka, heroo de USSR. — El la vizitoj de eksterlandanoj la plej grava estis de la dana redaktoro Johannes Vesterland-Andersen, kiu en la Uzina Klubo prelegis pri Danlando kaj respondis la demandojn de la ĉeestantoj. Estis prezentita kolora filmo pri Danlando, kiun por ĉi tiu okazo pruntedonis Dana Ministerio por Trafiko. — Kun helpo de la Slovaka Nacia Muzeo la rondeto peris al li viziton de folkloraj vilaĝoj en Liptov, krome la viziton de la urbestro de Žilina kaj de la folkloro vilaĝo Čičmany. — En Martin li povis viziti ankaŭ la Teatron de Slovaka Nacia Revolucio kaj interparoli kun la estraro kaj aktoroj (prila televida prezentado de dana klasika komedio de Holberg „Jeppe de la monto“, fare de la martinaj aktoroj, li aperigis fotografiaĵojn kaj notojn en pli ol 100 danaj gazetoj). Rondetano akompanis lin eĉ en Altajn Tatrojn, kie li povis fari kelkajn ekskursojn, per kiuj li estis ravita. — Pri la „Forportado de Morena“, malbona diaĵo de la vintro, li prelegis en la dana radio. — Du gejunuloj partoprenis la Internacian junularan tendaron en la pola urbo Katowice. — Por plirapidigi la finkonstruon de la Uzina Klubo la rondetanoj proponis kaj plenumis 100 laborhorojn, ekzemplodone por la ceteraj uzinaj rondetoj.

OLOMOUC. Okaze de la 5-a tutŝtata ekspozicio de ornama ĝardenkulturo (15. 8.-6. 9. 1964) estis eldonita 9-lingva kolora invitilo; merite de Esperanto-rondeto ĉe Parko de Kultura kaj Ripozo, ankaŭ esperantlingve. Ĉi-okaze la rondeto aranĝis renkontiĝon de esperantistoj, kun vespera kulturprogramo.

PODĚBRADY. Esperanto-rondeto ĉe Sindikata Komitato de Ĉeĥoslovakaj Ŝtataj Baninstitutoj havas 50 registritajn anojn. En marto, kune kun sindikatanoj de la stacidomo, estis festita Internacia Tago de Virinoj. — En junio okazis Kvinna renkontiĝo ĉe la rivero Labe (vidu apartan raporton).

En novembro Radio Praha, disaŭdigoj por Aŭstrujo, aranĝis interparolon kun la rondetanoj pri ilia laboro. — Komence de decembro estis sendita sonbendigita programo por la soleno de Esperantista Klubo en Skotlando (ĝi alvenis ĝustatempe). — En decembro okazis ankaŭ solena Zamenhof-vespero, kun diafilmoj. — La rondeto aranĝis sukcesan ekspozicion de Esperantaĵoj, en la banloka Kolonaro. Kelkaj rondetanoj vizitis la aranĝojn de aliaj rondetoj, unu partoprenis, kiel turisto, la UEA-Kongreson en Hago. — S-ano Josef Chvosta por „Esperanto en Skotlando“ tradukis la rakonton de Jiřina Trojanová: Oni ne rajtas timigi infanojn!“ — Reciproke skota s-ano Tom Fraser sendis sian literaturan eksperimenton komparadon de tradukoj de skota poeto R. Burns. — „The Esperantist Teacher“ en la februara n-ro aperigis la alvokon de la rondeto. — „Edukado Internacia“ 1964) aperigis la artikolon de s-ano J. Chvosta „Matematiko en la lernejo“ kaj „Instruista movado en ĈSSR“; krome „Universala Revuo“ lian artikolon pri „Numero Pi“ kaj en la sekvaj numeroj liajn artikolojn: Oni ne povus tion kredi“ kaj „Nia kalendaro“. — Okaze de la 500-jara jubilea de la pacproponoj de la ĉeĥa reĝo Jiří z Poděbrad la rondeto eldonis leterpaperojn kaj kovertojn kun okaza Esperanta teksto.

KVINA RENKONTIĜO EN PODĚBRADY

La kvinan renkontiĝon de esperantistoj (la 6-7-an de julio) partoprenis entute 150 personoj, inter ili ankaŭ gasto el Hungarujo. Sabate posttagmeze oni trarigardis la urbon kaj post komuna vespermanĝo okazis programvespero en la Banloka Klubo. La ĉeestantaron oficiale salutis la reprezentanto de la Urba Nacia Komitato. La programo estis kaj instrua kaj amuza. Poste al la dancemuloj ludis kvarmembra

orkestro. La halo estis ornamita kaj sur la tablojn estis metitaj paperkolombinoj kun steletoj, kiujn la eksterurbaj gastoj povis preni por memoro. La sekvan tagon oni vizitis la ekspozicion okaze de la 500-jara jubileo de la pacproponoj de la ĉeĥa reĝo Jiří z Poděbrad. Poste la gastoj estis navigitaj al la somerumejo Oseček je 8 km distanco de Poděbrady. Post duonhora navigado la gastoj forlasis la ornamitan ŝipon kaj sidiĝis sur la bordo de Labe por pridiskuti la peresperantan laboron kaj ĝiajn metodojn. — La renkontiĝo finiĝis per komuna fotografado kaj ludoj. Por adiaŭo oni kantis „La Espero”-n.

PROSTĚJOV. La 25-an de februaro estis fondita Esperanto-rondeto ĉe Klubo de Maŝinkonstruistoj en Prostějov. Ĝi elektis gvidantaron, tuj komencis kurson por 36 partoprenantoj kaj pritraktis la partoprenon en „Prostějov de Wolker”. En marto estis komencita kurso en la Meza Industria Vestajlernejo en Prostějov, kun 16 aliĝintoj.

PŘÍBOR. Esperanto-rondeto ĉe Klubo de Laboruloj en Prostějov kolektis 20 kg da papero favore al la Esperanta preso. — Estis eldonitaj poŝtkartoj kun ombrobildo de la urbo. — Estis fondita rondeto de virinoj — porpacaj batalantinoj. — La 21-an de junio estis inaŭgurita statuo de Th. Čejka, studinta en Příbor dum la jaroj 1894 — 98. La lokon kaj materialon senpage disponigis la Urba Nacia Komitato, nur la konstruadlaborojn faris la rondetanoj kiel brigadanoj. — En la stacidomo kaj flughaveno estis lokigitaj tabuletoj indikantaj la Esperanto-servojn de la rondeto.

ROKYCANY. Ĉe la Popola Observatorio en Rokycany estis fondita Esperanto-rondeto. Ĝiaj anoj propagandis la Observatorion, helpe de Esperanto, ankaŭ eksterlande. La gvidanto de la rondeto, k-do Jaroslav Mráz prilaboradis la esperantlingvan parton de la diverslingva astronomia vortaro, kiun eldonadas Ĉeĥoslovaka Scienca Akademio.

STARÝ BOHUMÍN. La 24-26-an de oktobro 1964 okazis Esperanta ekspozicio sub la titolo „Infanaj desegnaĵoj el eksterlando”. La ekspozicion, aranĝitan fare de la Esperanto-rondeto ĉe Kleriga Asocio en St. Bohumín; vizitis la tuta Baza naŭjara lernejo kun geinstruistoj kaj multaj plenkreskuloj. Samtempe aliĝis kelkaj gejunuloj al la kurso por komencantoj, inaŭgurita la 29-an de oktobro. (J. M.)

SVITAVY. Esperanto-rondeto ĉe Komuna Klubo de Laboruloj en Svitavy kunlaboras kun E-rondetoj en Česká Třebová kaj Litomyšl. Ekz. la 22-an de marto okazis komuna kunveno en Svitavy kun ripetita raporto pri la 48-a UEK en Sofio, kun koloraj lumbildoj. La 19-an de aprilo dum komuna kunveno en Litomyšl prelegis s-ano Jozefo Vítek pri Feroraj insuloj. — La 31-an de majo estis aranĝita komuna kunveno en Česká Třebová. — Dum la jaro 1964 vizitis nin jam la unuaj eksterlandaj geamikoj. La 13-an de aprilo ĉeestis nian kunvenon s-ano Jakobo Moll el Nederlando. — S-anino Maria Haagh el Budapeŝto en nian memorlibron skribis jenon: „Iom hezite mi venis al Svitavy, sed kun sincera ĝojo mi konfesas, ke jam ekde la unuaj momentoj mi sentis min hejmece inter karaj amindaj homoj, en vera esperantista familio.” Ŝi faris publikan prelegon pri Hungarujo kaj la vortojn akompanis per koloraj diapozitivaj. Tio ĉi estis la unua publika aranĝo por la neesperantista loĝantaro. La prelegon ŝi ripetis ankaŭ en Česká Třebová. — Dum februaro kaj marto okazis elsendo pri nia grupo, organizita fare de Radio Praha, Esperantaj disaŭdigoj por Aŭstrujo. Ni poste ricevis salutleterojn el diversaj lokoj.

Ok rondetanoj vizitis la Junularan kunvenon en Klodzo (Pollando) kaj s-ano Rýznar, la gvidanto de la rondeto, la 48-an UEK en Sofio. — Laŭ la instigo publikigita en la 15-a n-ro de Informoj de CSEK ni elektis delegiton por la Junulara sekcio, en la persono de Jitka Vránová, Kollárova 7, Svitavy.

TŘEBÍČ. La Domo de Pioniroj de Gustava Kliment kaj Klubo de Esperantistoj ĉe Kleriga Doma de B. Václavek, en kunlaboro kun Svazarm ĉe KDBV en Třebíč, organizis jam la 13-an tradicion E-speranto-tendaron kun plena sukceso. (Ĉar mankas raporto, ni atentigas pri la preparlaboroj por la 14-a SET).

VSETÍN. S-ano Aleš Berka (Vsetín 1432), jam longe cerbumadis, kiamaniere revivigi nian aferon en la moravia urbo. — En decembro 1964 li komencis instrui Esperanton al 20 personoj en Tatran OSP — ŝaka fako, kies gvidanto li estas. Post la fino li intencas fondi E-rondeton ĉe Kultur- domo en Vsetín.

ŽIAR NAD HRONOM. Esperanto-rondeto ĉe Uzina Klubo de Sindikata Revolucia Movado havis la 12-an de oktobro sian jarkunvenon. Malgraŭ malfacilaĵoj kaj ne tute kontentigaj aktiveco kaj laboro, la rondeto krom regulaj konvenoj akiradis materialojn por aliaj rondetoj de la Uzina Klubo, havis kontakton kun pluraj en- kaj eksterlandaj rondetoj kaj zorgadis pri informa kesteto. Du anoj partoprenis la Someran Esperanto-Universitaton en Gyula (pron.: Djula), Hungarujo. — Ges-anoj Prachárová kaj Kankrini — la plej aktivaj kaj oferemaj geanoj, estis proponitaj por premiigo.—

ZPRÁVY ČESKOSLOVENSKEHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU — INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO - KOMITATO. — Vydává — Eldonas: Osvětový ústav v Praze, Blanická 4, Praha 2. Řídí redakční kruh — Redaktas la redakta komitato: J. Cíhová, Dr. L. Izák, O. Kníchai, F. Sviták, E. V. Tvarožek. Tisk — Preso: TSNP Martin V-15*61312